

PROTOKOLO

Pri la Komitata Kunsido de TEJO en Aného (Togolando)

La 7-an ĝis la 11-an de aŭgusto 2017

Dumkunsido protokolita de Carlos Pesquera Alonso kaj Fériel Djenidi

kaj kompilita de Ĝenerala Sekretario de TEJO Hoan Tran (Ĝojo)

PARTOPRENINTOJ

Komitato

Dum la kunsido, la partoprenantoj reprezentas 27 komitatanojn

Volontuloj

1. Fériel Djenidi
2. Pierre Vittet

La listo de ĉeestintoj kaj anstataŭintoj troviĝas en [Suplemento 1](#).

I. UNUA SESIO 07.08.2017

1. Malfermo

Léon Kamenický, kiel kunsidestro, malfermas la kunsidon je la 11:22.

2. Propono kaj kandidatigo por la voĉdona komisiono

Venas peto por kandidatoj por la voĉdona komisiono: Tomasz kaj Bernard sin proponas. Sekvas peto por kandidatoj por la propona komisiono. Michael Boris proponas Joop kaj Arina proponas Sara. Joop kaj Sara akceptas la proponon.

3. Kvorumo

Michael Boris informas ke estas 33 komitatanoj post la falo de Hamed Sufi el Irano - pro nepartopreno en voĉdonoj, kaj Ivan Camilo Quintero Santacruz - pro ne individua membreco. La partoprenantoj reprezentas 27 komitatanojn, tio estas pli ol triono (11), kaj sekve estas kvorumo.

4. Prezento de Tagordo

Leon prezentas la tagordon. Pierre proponas aldoni du punktojn: financa mastrumado en sendependa TEJO kaj informoj pri subvencioj. Neniu malkonsentas. La unua estas aldonata en la punkto pri rilatoj kun UEA, kaj la dua estas aldonita ĉe Ceteraĵoj.

Enric informas ke lia proponita tagordero pri oficialigo de la uzata emblemo de TEJO ne aperas en la tagordo kaj proponas ties aldonon. Neniu kontraŭas, kaj la punkto estas aldonita ĉe Ceteraĵoj. Francesco proponas duobligi la punkton pri elekto de komitatanoj Ĉ, kaj trakti ĝin ankaŭ komence de la kunsido. Neniu kontraŭas.

Michael Boris proponas komenci trakti la punkton pri Pasporta Servo kaj plu trakti ĝin post la ricevo de la raporto de la komisiitoj pri PS. La punkto estas aldonita post la rezulto de strategia forumo. La tagordo - kun ĉiuj prezentitaj amendoj - estas aprobata kun 27 favoraj voĉoj, 0 kontraŭaj, kaj 0 sindetenoj.

5. Propono por komitatanoj Ĉ

Francesco proponas Rakoen Maertens el Belgio. Li akceptas la proponon. La voĉdona komisiono pretigas la balotilojn, kaj dume postaj tagorderoj estas traktataj.

6. Strategia forumo

Enric prezentas proponon por partoprenigi membrojn en la vivo de TEJO, kaj sekve demokratiigi ĝian funkciadon. Forumo dum la IJK 2017 okazos dum pluraj vesperoj por kolekti kaj pluevoluigi ideojn de la membroj de TEJO por la nova laborplano.

7. Pasporta servo

Michael Boris parolas pri la agado de la pasinta jaro, dankas la komisiitojn pro la sukcesa laboro, kaj invitas al la kreo de laborgrupo por analizi ĝian estontecon, konsiderante kostojn kaj oportunojn. Joop, Charlotte, Jérémie kaj Francesco volontulas por la dumkongresa laborgrupo.

8. Elekto de komitatano Ĉ

La voĉdona komisiono informas ke Rakoen estas elektita komitatano Ĉ kun 23 favoraj voĉoj, 2 sindetenaj, kaj 1 kontraŭa.

9. Laborgrupoj pri motivo de komitataneco

Enric prezentas la celon de la laborgrupo por pripensi motivojn por komitataniĝi, eventuale farante videon por varbi kaj engaĝi komitatanojn. Léon, Romualda, Querino kaj Enric volontulas por la dumkongresa laborgrupo. Michael Boris proponas Jérémie kaj li akceptas.

10. Rilatoj kun UEA

Michael Boris prezentas la situacion kaj la nunajn malfacilaĵojn. Estiĝas longa debato, partoprenita de pluraj komitatanoj, pri la financa mastrumado, la malfruoj en la pagoj, kaj la rolo de la Ĝenerala Direktoro en TEJO.

Arina, Charlotte, Enric, Fernando, Francesco, Joop, Michael Boris, Rakoen, kaj Sara volontulas por partopreni en la dumkongresa laborgrupo.

11. Fermo

Léon fermas la sesion je la 13.00.

II. DUA SESIO 08.08.2017

1. Malfermo

La dua sesio malfermiĝis je la 11.15

2. Prezentoj de la kandidatoj por la Elekta Komisiono kaj Estraro

Nome de la propona komisiono, Sara legas la raporton de la Elekta Komisiono.

Sekve ĉiu kandidato estas petata sinprezenti. Arina demandas ĉu sia kandidatiĝo validas sen la sendo de vivresumo kaj letero. Michael Boris legas la koncernan regularan paragrafon kiu klarigas ke tiuj ne estas necesaj nepraj kondiĉoj. Arina prezentas sian kandidatiĝon al la aliaj komitatanoj kaj respondas al la demandoj de la komitatanoj.

Carlos prezentas sian kandidatiĝon por posteno de Ĝenerala Sekretario al la aliaj komitatanoj kaj respondas al la demandoj de la komitatanoj.

Charlotte prezentas sian kandidatiĝon kiel vicprezidanto kaj estrarano pri aktivula trejnado al la aliaj komitatanoj.

Konstanze prezentas sian kandidatiĝon kiel estrarano pri eksteraj rilatoj al la aliaj komitatanoj. Ŝi klarigas ke en la raporto de la Elekta Komisiono ŝi estas proponita kiel estrarano pri subvencioj sed ŝi ne pretas je tio. Michael Boris klarigas ke li proponis tiun rolon por la venonta estraro, kaj aparte por Konstanze, konsiderante ŝian aktivan engaĝiĝon en projektmastrumado.

Enric prezentas sian kandidatiĝon kiel prezidanto al la aliaj komitatanoj.

Francesco prezentas sian kandidatiĝon kiel estrarano pri eksteraj rilatoj kaj rilatoj kun UEA al la aliaj komitatoj.

La kandidatoj kiuj ne ĉeestas en la kunsido estas sekve prezentitaj de aliaj homoj.

Fernando prezentas la kandidatiĝon de Adrian Alejandro.

Carlos proponas amendi la raporton de la Elekta Komisiono rilate al la kandidatiĝo de Ana Ribeiro, ĉefe rilate al la kunlaboro kun UEA. Francesco klarigas ke ne eblas ŝanĝi la raporton, ĉar la Komitato nur ricevas ĝin, sed rajtas diskuti ties enhavon.

Pluraj komitatoj malrekomendas subteni Ana Ribeiro.

Enric prezentas la kandidatiĝon de Doniben Jimenez Jaramillo.

MB prezentas la kandidatiĝon de Hoan Tran (Ĝojo) kaj de Mung Bui (Feliĉa).

Léon rekomendas ke la komitatoj uzu la tempon antaŭ la baloto por ekkoni kaj pridemandi la kandidatojn.

La resto de la tempo estis uzita de la komitatoj por formuli pli da demandoj al la kandidatoj.

Charlotte, Konstanze kaj Francesco pretas kandidatiĝi kiel vicprezidanto.

Enric proponas ke estu elektita 7-kapa estraro, kaj pli funda diskuto estas lasita al posta sesio.

III. TRIA SESIO 09.08.2017 (matene)

Léon anoncas ke alvenis propono por aranĝi publikan voĉdonadon por la elekto de la novaj estraranoj, dum la vespero, je la 21:00, kun prezento de kandidatoj kaj ebleco por la partoprenantoj pridemandi ilin. La propono estas voĉdonata kaj aprobita kun 22 voĉoj favoraj, 2 kontraŭ kaj 2 sindetenoj.

Léon informas ke Tomasz proponas aldoni la temon pri la taskaro de la ĝenerala sekretario al la tagordo. Tomasz klarigas la kialon de la propono, nome ke la ĝenerala sekretario havas tro da laboro kaj proponas disdividon de la laboro. La propono pri aldono de la tagordero estas aprobita kun 24 voĉoj favoraj kaj 2 sendetenoj.

Post interkonsultiĝo, la propona komisiono formulas la jenan proponon por la komitato:

“Ŝanĝo de la reglamento pri estraro:

Oficoj, artikolo 4: forigo de ‘kontrolas la efektivigon de la decidoj de la Komitato kaj de la Estraro, ‘

Kompetenteco, artikolo 1: aldono de punkto: ‘elektas inter si respondeculon pri kontrolado de la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj de la Estraro’ “

La propono estas aprobita kun 24 voĉoj favoraj kaj 2 sindetenoj.

Tomasz proponas ke la prezidanto kaj la vicprezidantoj ne rajtu surprizi ĉi tiun respondecon. Post diskuto inter la komitato, Tomasz retiras sian proponon, kaj prokrastas al posta reta traktado.

Léon klarigas la procedurojn pri la voĉdonado, kaj ekas debato pri la nombro da estraranoj.

La Elekta Komisiono proponas 9 estraranojn. Enric proponas ke estu voĉdono por 7, 8 aŭ 9 estraranoj.

Post diskuto, la elekta proceduro estas jena: ĉiu komitatano rajtas voĉdoni por pli ol unu eblo, kaj la venkanta propono estas tiu kiu ricevas maksimumon da voĉoj.

La rezultoj de la voĉdonado estas jenaj:

9-kapa estraro: 11 voĉoj favoraj

8-kapa estraro: 8 voĉoj favoraj

7-kapa estraro: 16 voĉoj favoraj

Sekve, la komitato decidas pri 7-kapa estraro.

Nun la kunsidestro malfermas debaton pri la nombro da vicprezidantoj. Enric proponas 3. Tomáš proponas 2. La voĉdono okazas sekvante la antaŭan proceduron, kun jenaj rezultoj:

2 vicprezidantoj: 15 voĉoj favoraj

3 vicprezidantoj: 13 voĉoj favoraj

Sekve, la komitato decidas pri 2 vicprezidantoj.

IV. KVARA SESIO 09.08.2017 (vespere)

1. Malfermo

La vespera sesio komenciĝis je la 21:00.

Michael Boris salutas ĉiujn ĉeestantojn en la publiko kaj komitato, dankas por bona kunlaborado dum la antaŭaj jaroj.

2. Debata fazo

Ĉiuj kandidatoj sinprezentas dum po unu minuto, kaj la publiko havas tempon por pridemandi la kandidatojn.

3. Voĉdonado

Post la fino de la debata fazo, la voĉdona komisiono konfirmas ĉeeston de kvorumo. Pro la peto de Krishna Sivilla Rubio voĉdoni el la lito pro malsano, du pliaj homoj - Romualda Jeziorowska kaj Paulína Jalakšová - estas proponitaj por la voĉdona komisiono, tiel ke ili povu alporti la balotilojn al la ĉambro. La propono estas aprobita kun 23 voĉoj favoraj kaj 1 sindeteno.

Sekvas voĉdono por la Prezidanto. Pau Codina Alemany (Enric) estas elektita prezidanto de TEJO kun 22 voĉoj favoraj, kaj 3 sindetenoj.

Sekvas voĉdono por la 2 Vicprezidantoj, kun jenaj rezultoj:

Francesco: 14 voĉoj

Charlotte: 13 voĉoj

Konstanze: 16 voĉoj

Unu balotilo estas nevalida.

Francesco kaj Konstanze estas elektitaj kiel vicprezidantoj.

Sekvas voĉdono por la Ĝenerala Sekretario, kun jenaj rezultoj:

Ĝojo: 18 voĉoj

Carlos: 4 voĉoj

2 balotiloj estas blankaj, kaj 1 ne estas valida

Ĝojo estas elektita kiel ĝenerala sekretario.

Sekvas voĉdono por la Kasisto.

Mung Bui Feliĉa estas elektita kun 20 voĉoj favoraj, 5 balotiloj estas blankaj.

Sekvas voĉdono por la estraranoj, kun jena rezulto:

Ana: 0 voĉoj

Doniben: 10 voĉoj

Charlotte: 18 voĉoj

Arina: 11 voĉoj

Adrián: 8 voĉoj

Sekvante la elektan regularon, Ana ne estas elektita, kaj estas nova voĉdono inter la restantaj 4 kandidatoj, kun jenaj rezultoj:

Doniben: 10 voĉoj

Charlotte: 20 voĉoj

Arina: 12 voĉoj

Adrián: 8 voĉoj

Sekvante la elektan regularon, Charlotte estas elektita, ĉar ricevis pli ol duono da favoraj voĉoj

Arina rezignis do estas nova voĉdono inter Doniben kaj Adrián, kun jenaj rezultoj:

Doniben: 16 voĉoj

Adrián: 10 voĉoj

Doniben estas sekve elektita kiel estrarano de TEJO.

V. KVINA SESIO 11.08.2017

La sesio malfermis matene la 11-an de aŭgusto 2017.

1. *Elekto de komitatano Ĉ*

Kandidatiĝoj por komitatanoj ĉ. Michael Boris anoncas ke li emas kandidatiĝi. Rakoen kaj Fernando subtenas lin. Roméo Kouessan sin proponas kiel Komitatano Ĉ. Koffitche kaj Tomasz subtenas lin, kiel plej bona maniero por spertiĝi pri internacia agado.

Michael Boris sin deklaras preta helpi la novan Ĝeneralan Sekretarion en preparo de la raporto pri plenumo de la ĝisnuna laborplano, kvankam ne mem verki la raporton. Li legas la koncernan paragrafon pri la rolo de la Komitatano Ĉ el la komitataj reglamentoj.

Francesco klarigas ke nun estas 4 komitatanoj Ĉ. Li anoncas sian demision kiel komitatano Ĉ ĉar li estas elektita en la estraro, tiel li daŭre havos nur 1 voĉon. Ambaŭ kandidatoj rajtas esti elektitaj, ĉar la kvanto da komitatanoj Ĉ ne superus la limon. Francesco ankaŭ klarigas ke rajtas voĉdoni nur komitatanoj A, B kaj C por elekti novajn komitatanojn Ĉ.

Michael Boris kaj Roméo estas elektitaj kiel komitatanoj Ĉ, ambaŭ kun 15 voĉoj favoraj.

2. *Elekto de la Elekta Komisiono*

Ekekto de nova Elekta Komisiono. Arina Osipova, Fernando Maia Jr., Eddy Onan, Michael Boris Mandirola kaj Carlotta Pavese kandidatiĝas. Boris klarigas la rolon de la Elekta Komisiono. Konstanze substrekas ke la membroj de la komisiono ne povas kandidatiĝi la sekva jaro kiel estrarano. Francesco proponas 5 personojn. Enric proponas 3 personojn. Roma proponas 4 personojn. La komitato voĉdonas inter la tri opcioj laŭ la jam uzita metodo, kun la jena rezulto.

3-kapa komisiono: 10 voĉoj

4-kapa komisiono: 11 voĉoj

5-kapa komisiono: 8 voĉoj

Sekve la komitato decidas por 4-kapa komisiono. Dum la voĉdona komisiono pretigas la balotilojn, la sekvaj eroj en la tagordo estas traktataj.

3. *Strategia forumo*

Enric prezentas la strategian forumon, kiu okazis dum la kongreso. Fernando laŭdas Enric pro la iniciato. Enric petas reprezentanton el ĉiuj kvin laborgrupoj rapide prezenti ideon.

- ★ Francesco prezentas la planojn por akreditigi TEJOn ĉe ECOSOC / UN.
- ★ Sara prezentas ideon pri engaĝiĝo de membroj kaj plibonigo de internaciaj rilatoj
- ★ Arina prezentas ideon krei allogajn videojn por videbligi la eblecojn kiujn TEJO donas por novaj membroj
- ★ Charlotte prezentas ideon krei laborgrupon kaj diskutrondojn por plibonigi komunikadon de TEJO kun landaj sekcioj.

4. Elekto de la Elekta Komisiono (daŭrigata)

Eddy decidis retiri sian kandidatiĝon en la Elekta Komisiono, konsiderante ke li povus kandidatiĝi en la sekva estraro de TEJO. Sekvas la elektoj por la membroj de la Elekta Komisiono, kun jenaj rezultoj:

Fernando: 22 voĉoj

Arina: 18 voĉoj

Michael Boris: 17 voĉoj

Carlotta: 18 voĉoj

Ĉiuj kvar kandidatoj estas elektitaj en la Elekta Komisiono.

5. Prezentoj de dumkongresaj laborgrupoj.

a. La laborgrupo pri la rilatoj TEJO - UEA

Francesco prezentas la rezultojn de la laborgrupo pri la rilatoj TEJO - UEA, kaj la progresojn de la laborgrupo dum la Universala Kongreso en Seulo. La laborgrupo proponas jenan tekston:

=====

La komitato de TEJO

- substrekas la gravecon de reciproke fruktodona kunlaboro kun UEA;
- esprimas zorgon pri la misevoluoj inter TEJO kaj la Centra Oficejo;
- subtenas la pozitivan konstruan sintenon de la diskutoj dum la Universala Kongreso de la laborgrupo pri la rilatoj inter TEJO kaj UEA;
- pledas por la aplikado de la regularo pri kunlaboro, akceptita de ambaŭ komitatoj;
- taskas la estraron de TEJO k alvokas la estraron de UEA por rapida trakto de la financ-rilataj temoj, kaj de komuna politiko pri datumtraktado;
- rekomendas al la estraroj de UEA kaj TEJO kune analizi la situacion en la Centra Oficejo, kaj regule kontaktiĝi kun la diversaj homoj enplektitaj, cele al harmonia etoso;
- taskas la estraron raporti al la komitato post du monatoj.

=====

La propono estas aprobita kun 22 favoraj voĉoj kaj 1 kontraŭa.

b. La laborgrupo pri Pasporta Servo

Francesco prezentas la rezultojn de la laborgrupo pri Pasporta Servo. Laŭ la raporto de la nunaj prizorgantoj, estus bezonataj ĉirkaŭ 15 mil eŭroj jare por plua vartado de la projekto. Kvankam la laboro farita estis tre bona, malfacilas trovi regule tiom altan sumon en la financoj de TEJO. Estis diskuto pri alternativaj eblecoj, kiel ekzemple presado de la libro nur ĉiun kvinan jaron, aŭ nur laŭpete kunlabore kun iu specialigita entrepreno. La ideo pri memstara projekto ankaŭ estis konsiderata, kvankam ĝi estas plustudinda por taŭge garantii kaj TEJOn kaj la homojn engaĝitajn en ĝi, ekzemple per licenco de TEJO. Bedaŭrinde ne eblis pli profunde trakti la temon, kaj estas

rekomendo ke komisiono daŭrigu la laboron post la kongreso. Carlos, Charlotte, Enric, Joop, Francesco estas en tiu laborgrupo. Fernando proponas ke la laborgrupo invitu Juliana kunlabori ĉar ŝi jam laboras pri tio. La propono estas akceptita kondiĉe ke ŝi akceptas.

6. Ceteraĵoj

La estraro proponas forigi el la tagordo la punkton 13 (konfirmo de la komisiitoj), ĉar ankoraŭ ne eblis disdividi la taskaron inter la diversaj estraranoj kaj sekve konfirmi aŭ nomumi novajn komisiitojn. Francesco ankaŭ atentigas ke por la estonteco, ĝi laŭeble ne estu tagordero por la komitato, ĉar respondeco pri komisiitoj kuŝas ĉe la estraro.

Enric prezentas la diversajn projektojn kaj subvenciojn en kiuj TEJO estas enplektita, kune kun diversaj LSj.

Enric proponas la oficialigon de la nun plej uzata oficiala logoo ([alkroĉita](#) al la protokolo) kaj arkivigi ĉiujn aliajn malnovajn. La propono estas aprobita kun 23 favoraj voĉoj.

VI. FERMO

La kunsido estas fermita je la 13:16 la 11an de aŭgusto 2017

LISTO DE ĈEESTINTOJ KAJ ANSTATAŬINTOJ ĜIS LA 4A SESIO

No.	Nomo, organizo	Rolo	Anstataŭanto
1.	Michael Boris Mandirola	Prezidanto	
2.	Arina Osipova	Ĝenerala Sekretario	
3.	Pau Codina Alemany (Enric)	Estrarano	
4.	Adrian Alejandro (JEA)	Kom. A	Fernando Maia
5	Bernard Gnancadja (BOJE)	Kom. A	
6	Querino Neto (BEJO)	Kom. A	
7	Gilbert Niyukuri (JEBUO)	Kom. A	Mlosse Saibi
8	Vít Guiguelmo Mišurec (ĈEJ)	Kom. A	Paulina Jalalesova
9	Mia Nordentoft (DEJO)	Kom. A	Charlotte Larsson
10	Lucas Teyssier (JEFO)	Kom. A	Olympe Agbanglo
11	Konstanze Schonfeld (GEJ)	Kom. A	
12	Charlotte Larsson (GEJ)	Kom. A	
13	Veronika Venislovas (HEJ)	Kom. A	Romualda Jeziorowska
14	Álex Escomu (HEJS)	Kom. A	Krishna Sevilla Robio
15	Masaja Sešimo (JEJ)	Kom. A	Konstanze Schonfeld

16	Emanuele Regano (IEJ)	Kom. A	Sara Spanò
17	Krishna Sevilla Robio (KEJ)	Kom. A	
18	Eddy Onan (DKEJO)	Kom. A	
19	Tobiasz Kubisiowski (PEJ)	Kom. A	Romualda Jeziorowska
20	Tomasz Szymula (PEJ)	Kom. A	
21	Kirill Noviĉenko (REJM)	Kom. A	Fernando Maia
22	Tomáš Stano (SKEJ)	Kom. A	
23	Koufionou Koffitche (JOTE)	Kom. A	
24	Hoan Tran (VEJO)	Kom. A	Jeremie Sabiyumva
25	Carlos Pesquera Alonso (BEMI)	Kom. A	
26	Alexandre Raymond (EUROKKA)	Kom. A	Querino Neto
27	Abel Johannes “Joop” Kiefte	Kom. Ĉ	
28	Francesco Maurelli	Kom. Ĉ	
29	Rakoen Maertens	Kom. Ĉ	

LISTO DE ĈEESTINTOJ KAJ ANSTATAŬINTOJ POST LA 4A SESIO

No.	Nomo, organizo	Rolo	Anstataŭanto
1.	Pau Codina Alemany (Enric)	Prezidanto	
2.	Konstanze Schonfeld	Vicprezidanto	
3.	Francesco Maurelli	Vicprezidanto	
4.	Charlotte Larsson	Estrarano	
5.	Adrian Alejandro (JEA)	Kom. A	Fernando Maia
6.	Bernard Gnancadja (BOJE)	Kom. A	
7.	Querino Neto (BEJO)	Kom. A	
8.	Gilbert Niyukuri (JEBUO)	Kom. A	Mlosse Saibi
9.	Vít Guiglielmo Mišurec (ĈEJ)	Kom. A	Paulina Jalalesova
10.	Mia Nordentoft (DEJO)	Kom. A	Charlotte Larsson
11.	Lucas Teyssier (JEFO)	Kom. A	Olympe Agbanglo
12.	Julia Berndt (GEJ)	Kom. A	
13.	Veronika Venislovas (HEJ)	Kom. A	Romualda Jeziorowska
14.	Álex Escomu (HEJS)	Kom.A	Krishna Sevilla Robio
15.	Masaja Sešimo (JEJ)	Kom. A	Konstanze Schönfeld
16.	Emanuele Regano (IEJ)	Kom. A	Sara Spanò
17.	Krishna Sevilla Robio (KEJ)	Kom. A	

18	Eddy Onan (DKEJO)	Kom. A	
19	Tobiasz Kubisiowski (PEJ)	Kom. A	Romualda Jeziorowska
20	Tomasz Szymula (PEJ)	Kom A	
21	Kirill Noviĉenko (REJM)	Kom. A	Fernando Maia
22	Tomáš Stano (SKEJ)	Kom. A	
23	Koufionou Koffitche (JOTE)	Kom A	
24	Carlos Pesquera Alonso (BEMI)	Kom. A	
25	Alexandre Raymond (EUROKKA)	Kom. A	Querino Neto
26	Abel Johannes “Joop” Kieft	Kom. Ĉ	
27	Michael Boris Mandirola	Kom Ĉ	
28	Rakoen Maertens	Kom Ĉ	
29	Romeo Kouessan	Kom Ĉ	

Suplemento 2



Tagordo:

- I. [Unua Sesio](#)
 - II. [Dua Sesio](#)
 - III. [Tria Sesio](#)
 - IV. [Kvara Sesio](#)
 - V. [Kvina Sesio](#)
 - VI. [Fermo](#)
-